ESPERANTO
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 6

JUNIO 2007 Kol. 266/23

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo:**
La V-a kongreso de AEH
La unuaj vortoj
Esperanto en pilsena radio
Grandega E-arbo en Olomouc
La rezolucio de la kongreso
Skokovy - XXIV-a
4 senpagaj libroj
Atentigo pri eraroj en la kanto

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## La V-a kongreso de AEH en Seč

de la 30-a de majo ĝis la 3-a de junio 2007



La granda areo de la JUNIORCENTRO Seĉ gastis la 5-an kongreson de AEH – IKEH. La E-flago super ĉefa enirejo kaptis atenton de alvenantoj same kiel la propaganda ronda signo inter du vitraj pordoj de la kongresejo. Sur la tablo de akceptejo kuŝis kelkaj dekoj de flugfolioj proponitaj por scivolemaj nees-perantistoj.

Dank´ al deko da verdaj montrosignoj, kiujn la organizantoj lokigis laŭ la tuta vojo de bushaltejo Seč al Juniorcentro, preskaŭ ĉiuj partoprenantoj atingis konatan vastegan Juniorcentron krom kelkaj, kiuj mise pasis ilin.

La nombro de aliĝintoj ne estis granda kaj ankoraŭ en lastaj tagoj antaŭ la kongreso kelkaj senkulpigis sin pro neĉeesto. El eksteraj landoj alvojaĝis nur tri germanaj kaj tri polaj geesperanistoj. Ilia partopreno tamen kreis la internacian etoson, kiu regis de komenco ĝis fino de la kongreso. Avantaĝo estis, ke ni en la sama

etaĝo povis tranokti kaj ankaŭ kunsidi, nur la memserva manĝejo estis en alia proksima pavilono.

La kongresan konferencon malfermis la fama kanto "Mi dankas al vi, sinjoro Ludoviko", kiun prezentis naŭmembra amatora kanthoro de niaj kongresaninoj, gvidata de la pola amikino Urŝula kun akordeono. Poste la prezidantino de AEH Jarmila Rýznarová bonvenigis ĉiujn, aparte sinjoron urbestron Lubomír Schmitt, kiu en siaj salutvortoj esprimis ĝojon, ke ni decidis aranĝi la kongreson en ĉarma loko de Fera montaro kaj ĉe la fama akvovalbaraĵo, pri kiu li detale informis. Same afable salutis nian kunsidon estrino de la Juniorcentro. Estis prezentitaj salutvortoj de la prezidanto de UEA d-ro Renato Corsetti, de la prezidantinoj ĈEA Jana Melichárková kaj de IKEH Delia Pick el Hamburg, de la E-kluboj el Aŭstralio, Belorusio, Brazilo, germana Nurnbergo, de sekretario de Instituto Zamenhof el Togolando kaj ankaŭ rekte sonregistritaj vortoj de la redaktoro de Radio Aktiva el Urugvajo. La polaj partoprenantinoj anstataŭ salutvortoj kantis belan kanton.



La prezidantino en sia enkonduka parolo menciis situacion de AEH, kiu vivas modeste, ŝpareme, do dank´ al tio sen ŝuldoj. Ŝi rememoris ĉijaran 120-an datrevenon de Esperanto, (pri kio pli precize prelegis s-anino Věra Podhradská, kiu krom tio informis nin pri nuntempa ĝojiga kresko de E-junularo en Ĉeĥa respubliko). La prezidantino diris, ke jam dek jarojn ŝi gvidas la asocion kaj ankaŭ pro kreskantaj sanproblemoj estas necese transdoni la gvidadon de la asocio al iu pli juna homo.



Ĉe la fino de sia parolo ŝi menciis la kongresan temon "Ne estu sola", kiu estis traktata en prelego la venontan tagon. Poste ŝi transdonis la vorton al Lenka Angelová por reciti la poemon "Amikeco", kiun esperantigis s-anino Jana Cíchová.

Kompleta raporto pri agado de AEH en la jaroj 2002 ĝis 2007 troviĝas en la kongreslibro, kiun ricevis ĉiuj partoprenintoj de la kongreso. Koncize oni povas diri, ke agado de la asocio estis konstanta kaj

diligenta. En pasintaj kvin jaroj oni aranĝis naŭ lingvajn seminariojn en Skokovy, kiuj entute jam estis 24. Lingvaj antaŭtagmezoj en Prago kaj Pardubice okazis de la kvara kongreso 37-foje. La asocia gazeto Informilo kun la suplemento Antaŭen aperadas tute regule dank´ al redaktorino kaj kelkaj kunlaborantoj. La asocio disponas ankaŭ pri interretaj TTT-paĝoj. Estas dezirata ankoraŭ plibonigo de ilia formo. El aliaj signifaj aranĝoj ni rememoru la kvintagan Internacian renkontiĝon en Rybitvi, la ekskurson al la 90-a UK en Vilnius, la propag-ekspozicion en la Regiona biblioteko en Pardubice kaj en la urba teatro en Žďár n. S., plue la preparon de videofilmo pri la IV-a kongreso en Jánské Lázně, la eldonon de broŝuro "Fabelo pri mielkuka dometo" kaj de ĉeĥlingva broŝuro (kiun verkis J. Rýznarová) "La vivo kaj verko de d-ro Schulhof". Regule ni kontrolas kaj tenas en bona stato la memortabulojn en Františkovy Lázně, Lány kaj Slaný kaj prizorgas nian propag-montrofenestron en Pardubice.



Nia asocio nun nombras 210 membrojn, el tio 50 eksterlandanojn el 18 landoj. Bedaŭrinde dum pasintaj kvin jaroj forpasis 19 niaj membroj. Honoron al ilia memoro!
Partoprenantoj de la kongreso ricevis liston kun supervido pri financa mastrumado de AEH ekde la IV-a kongreso. Oni povas konstati, ke la mastrumado, dank´al sia ŝpareco, plene kontentigas bezonojn de la agado de AEH. La ĉefaj fontoj de enspezoj estis membrokotizoj (209 mil. Kč), dotoj kaj donacoj (39 mil. Kč) kaj profito el AEH-aranĝoj. La enspezoj kovris kaj kurantajn materiajn elspezojn kaj "modernigon" de nia malnova komputilo kun programa ekipo, videokamero kaj kopiilo.

Ĉe la kongreso estis elektita nova komitato de AEH. La nova prezidanto estas Pavel Nechvíle, vicprezidantino Ludmila Srbová, ekonomo Josef Hron, sekretariino, kronikistino kaj redaktorino de Informilo Jarmila Rýznarová, kunredaktoro Míša Filip, organizantino de seminarioj en Skokovy Jindřiška Drahotová, komputila kunlaboro Jiří Kosnar, propagado de AEH Miroslava Kosnarová, kunorganizantino de E-aranĝoj Jana Křížková, ilustrado de kronikoj kaj tradukado de Informiloj en la ĉeĥan Zdenka Novotná, reprezentanto de IKEH Pavol Petrik, anstataŭanto de sekcio de nevidantaj esperantistoj Josef Krob. Revizia komisiono Dana Hricková, Lenka Angelová kaj Adolf Veselý.




La programo abundis pri interesaj prelegoj: Esperanto sur la radioamatoraj ondoj (ILERA), pri la interreta granda vortaro, rememoro je signifaj jubileoj de Jaroslav Mařík kaj František Kožík, pri 120-a datreveno de Esperanto kaj 90-a datreveno de morto de L. L. Zamenhof, invitoj por venontaj E-aranĝoj (Plasy, Lančov), disvolviĝis vigla diskuto.
Kompreneble amuziĝis la partoprenantoj dum danc-vespero kun bela muziko, riĉaj tombol-premioj, kvizo kaj kantado.



Surprizis nin alveno de televidaj redaktoroj de la regiona ĉeĥa televido, kiuj filmis ĉe la kongreso kaj poste dum la paŭzo ili faris intervjuojn kun kelkaj kongresanoj. Tuj la saman tagon ni povis vidi favoran raportaĵon en la elsendado de ČT 1 kaj ČT 24, kiu ĝojigis nin kaj same samideanojn ĉe hejmaj aparatoj. Mesaĝon pri la aranĝo ni sendis tra la maro – al la fora Radio Aktiva Urugvajo, kun kiu ni havas viglajn kontaktojn.


Vespera prezento de videofilma raportaĵo pri Usono, kanadaj Niagaraj akvofaloj kaj edziĝceremonio tie, plaĉis al la kongresanoj. Same interesa estis videoregistrita rememoro je la IV-a kongreso de AEH en Janské Lázně antaŭ kvin jaroj. Al bona etoso dum vesperoj kontribuis niaj muzikistoj, nome Jan Duda (violino), Urŝula Giercarz (akordeono), Martin Kumpošt kaj Milada Kolářová (gitaroj), kiuj akompanadis nian kantadon de Esperantaj, ĉeĥaj kaj polaj kantoj.

Kadre de la kongreso okazis ankaŭ du duontagaj ekskursoj kaj promeno surborde de la valbaraĵa lago. Tiam ni povis trairi eĉ internan spacon de la valbaraĵo.
Ne ĉiuj partoprenantoj sciis, ke en la urbo Hlinsko ekzistas pitoreska subĉiela muzeo – Betlehemo. Same preskaŭ neniu sciis, ke proksime de la urbeto Nasavrky troviĝas restaĵoj de kelta opidumo el la dua jarcento antaŭ Kristo. Ni povis vidi la ekspozicion pri vivo de niaj antaŭuloj en la muzeo de Nasavrky.



La sabatan ekskurson iomete rompis pluvo, do ni povis rigardi ruinon de la burgo Lichnice nur el buso. Tiam

Pavel Nechvíle rakontis la legendon pri kruela posedantino de la burgo. Post



agrabla kaj interesa travivaĵo – trarigardo de la kastelo Žleby ni vidis intime belan konstruaĵon de la valbaraĵo Pařížov, kie ni finis nian ekskursan posttagmezon.
Eble la partoprenantoj estis kontentaj…

kompilita de Rýznarová, Hron, Nechvíle, Turková

**La konkludoj de la V-a kongreso.**
**La kongreso aprobas:**
1. la raporton pri la agado ekde la IV-a kongreso
2. la raporton pri la mastrumado ekde la IV-a kongreso
3. novan statuton de la asocio rilate al nova leĝo pri civitanaj asocioj
4. la rezulton de la balotoj de nova komitato kaj revizia komisiono
5. la kongresan rezolucion

# La rezolucio de la V-a kongreso de AEH

La kongreso, kiu okazis de la 30-a de majo ĝis la 2-a de junio 2007 en urbeto Seč konstatas:
1. Nia organizo kunigas 210 membrojn, el tio 50 el 18 landoj, kio estas, rilate al la stato antaŭ kvin jaroj preskaŭ la sama, bedaŭrinde 19 anoj forpasis.
2. Nia organizo zorgas pri tio, ke handikapitaj homoj povu reciproke interŝanĝi informojn pri sia vivo kaj vivproblemoj kaj pri ebleco solvi tiujn problemojn helpe de la internacia lingvo Esperanto.
   Per la uzado de la neutrala lingvo ni tiamaniere plenumas la artikolojn 2 kaj 7 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiuj ĝis nun estas bedaŭrinde per la plimulto da aŭtoritatoj neglektataj.
3. Ni plu organizos renkontiĝojn, per kiuj ni ebligos al handikapuloj seniĝi de izoleco kaj soleco. Samtempe ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj-handikapuloj, ke ili diskonigu la internacian lingvon Esperanto eĉ inter membroj de aliaj organizoj.



Seč la 31-an de majo 2007

PaN

# La unuaj vortoj de la nova prezidanto

Karaj gesamideanoj !
Tuj post baloto de la nova komitato de AEH dum la kongreso mi diris, ke daŭrigi post eksprezidantino Jarmila Rýznarová estos tro malfacila tasko. Ŝian entuziasmon, ŝiajn spertojn akiritajn dum kelkaj dek jaroj de la agado en Esperanto-movado nur malfacile eblas anstataŭigi. Samtempe mi diris, ke helpe de vi mi provos kaj strebos, eĉ klopodos, ke la nivelo de la agado estu almenaŭ tia, kiel la ĝis nuna.
Sed sen laboro ne eblas manĝi kukojn – diras ĉeĥa proverbo. Do ankaŭ nin atendas ĉiutaga laboro, plenumo de taskoj. De taskoj etaj, vere ĉiutagaj, ĝis tiuj gravaj. Unue ni ĉiuj devas plenumi la rezolucion de la V-a kongreso de AEH.
La plej grava tasko plu estos perfektigi nian scion de la lingvo Esperanto. Tio estas grava supozo por diskonigi la lingvon Esperanto kiel komunikilo inter homoj de la mondo, klarigi avantaĝojn de la lingvo kaj laŭ ebloj kaj siaj povoj klopodi, ke nia lingvo apartenu al la oficialaj lingvoj en EU kaj UN.
Por plenumi tiujn ĉi taskojn ni bezonas ne nur strebon, sed ankaŭ sanon. Kaj sanon, firman sanon mi deziras al vi ĉiuj. Ankaŭ mi antaŭĝojas je via venonta subteno kaj helpo rilate al mi kaj al la tuta komitato.
Tute fine permesu, ke mi denove kaj oficiale danku, nome de vi ĉiuj, al Jarmila Rýznarová por ĉio, kion ŝi faris por AEH. Ankaŭ mi deziras al ŝi sanon kaj konstantan viglecon por plua agado de nia asocio.

Pavel Nechvíle

# Skokovy - XXIV-a

De 16-a aprilo 2007 okazis kutima seminario en Bohemia paradizo, loko Skokovy. Denove venis geesperantistoj el diversaj lokoj de nia lando kaj ankaŭ niaj amikoj el Nederlando, Francujo kaj Svedujo. Ĉar mankis nia ĉefinstruisto Jan Werner, konversacian grupon gvidis la fama Verda Lupo – Peter Breems el Nederlando. La grupo de Margit Turková laboris pri fakaj aferoj kaj la grupo de Líba Filipová amuzigis per lernado mezgradajn partoprenantojn. En la grupo de Jindra Drahotová aperis novuloj. Por gimnastiko venis ankaŭ nova vizaĝo. La vetero estis favora al ni. Ankaŭ vicurbestroj en Mnichovo Hradiště kaj en Mladá Boleslav estis afablaj al ni kaj invitis grupon de 15 partoprenantoj por vizito de siaj oficejoj. En Boleslav eĉ la vicurbestro preparis por ni du frazojn en Esperanto kaj aranĝis por ni grimpadon sur la urban turon por ĉirkaŭrigardi la regionon kaj spekti ekspozicieton pri teruraj okazaĵoj en la urbo dum mezepoko. En Mnichovo Hradiště la vicurbestro prezentis al ni urban teatron.

Krom vizito de bierfabriko en Klášter, ni vizitis la urban teatron en Mladá Boleslav, Centron de invalidoj kaj stel-observejon. La direktoro de stel-observejo estas Pavel Brom, studento de fakultato de matematiko kaj fiziko en Prago. Pere de lia prelego en Esperanto ni povis rigardi la Sunon ĉe subiro, Lunon kaj planedojn. Li kun sia kolegino eĉ montris, kiajn kutimojn, ankaŭ nun, praktikas junularo ĉe ni.

Prelego pri Astrid Lingren – sveda verkistino de infana literaturo – estis longa. Ĝin prelegis Kerstin Rohlin, svedino, kiu tradukis kelkajn librojn de Lingren al Esperanto. Prelego de Claude Ferrand temis pri Izraelo kaj nov-hebrea lingvo. Aleš Vávra klarigis al ni, kiel per nova aparato oni mezuras kvanton de pluvo kaj neĝo. Francoj, kiuj venis kun karavana buseto (kaj kun kato) prelegis pri paca movado. Nia kara doktoro Hradil ĝuis la etoson kaj la partoprenantoj admiris florantan naturon, kiun nia svedino komparis kun fabela medio el libroj de Lingren.

La venonta seminario okazos de la 15-a de oktobro 2007. Ĉu vi venos?

J.Drahotová

# Esperanto en la pilsena radiostacio

Agrablajn momentojn antaŭ Majfesta tagmezo travivis aŭskultantoj de Ĉeĥa radiostacio en Pilseno. Post la 11-a horo anoncis la redaktorino viziton de geesperantistoj. Mallonga interparolo kun doktoro Petro Chrdle kaj kun prezidanto de pilsena klubo Václav Kaprál konatigis la publikon kun la internacia lingvo Esperanto kaj kiel utiligi ĝin.

Parolatan vorton akompanis ankaŭ du E- kantoj kaj deklamo de Majo (K. H. Mácha). Kvankam la radioelsendo estis mallonga, tamen tre bone preparita. Danko por la propagando de nia belega lingvo apartenas al D-ro Chrdle kaj Václav Kaprál.

Věra Muchnová

## Jen afabla propono de svisa eldonejo :

4 senpagaj libroj por bibliotekoj de Esperanto-societoj.

Se via Esperanto-societo ne posedas la sekvajn librojn, petu la mankantajn titolojn ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando, kaj vi ricevos ilin senpage.

Titoloj de la 4 libroj :

Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga – La jogo de nutrado – Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko – Sub la regno de la kolombo: paco regu.

Temas pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj, nutrado, ktp. Aŭtoro: O. M. Aïvanhov. Esperantigo de Claude Piron. Por detalaj klarigoj vidu:
http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html

# Grandega Esperanta arbo en Olomouc

La EK en Olomouc festis la 75-an datrevenon de la planto de la E-arbo kaj de la konstruo de E-monumento. Ĝi okazis dum la ĉeesto de multaj eksterlandaj gastoj la 15-an de majo 1932. La planton de la arbo, alportitan el Suda Ameriko, nomata Lilio-tulip-flora kaj liaj radikoj estis priŝutitaj per la argilo el diversaj landoj de la mondo. Hodiaŭ estas el la valora planto jam grandega arbo.
Al solenaĵo de la signifa datreveno en la parko de Smetana ĉe la E-monumento renkontiĝis esperantistoj el proksimaj kaj foraj lokoj. Inter kvindeko de ĉeestantoj estis ankaŭ reprezentantoj de E-rondeto Amikeco el Česká Třebová, kiuj salutis la partoprenantojn. La prezidanto de Patruj-scienca muzea asocio en Olomouc d-ro Tichák alloge parolis pri historio de Esperanto en tiu ĉi urbo. La programon akompanis esperantistoj el Olomouc per muzik-komponaĵoj kaj per poemo "La vojo" de L. L. Zamenhof.

Zdena Novotná

**Atentigo:**
En la kongresa libro estas kelkaj preseraroj sur la 4-a paĝo ĉe la kanto "Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko..." Bonvolu korekti:

1) Pro verda koro de Julio, strečita kord´ de Koloman´
pro la kongres´ en Varsovio, pro renkontiĝo kun Japan´.
2) Pro la amikoj el Francujo, el Germanio kaj Kanad´,
el Itali´ kaj Hungario, pro belulin´ el Leningrad.
3) Pro juna negro komencanto kortuŝa franca melodi´,
ĉar ĉio dank´ al Esperanto, ĉar ĉio majstro dank´ al vi.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: M. Filip, J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.volny.cz/aeh-ikeh**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= 150,-Kč ,příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €.
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.